

PLUVAS

(D. Verde/D. Modugno)

Esperantigo: E. Rovere (Manŭel)

Mil violonoj ludataj de l'vento,
ĉiuj koloroj de l' ĉielarko
kuniĝas formi pluvon arĝentan,
sed pluvas, pluvas sur nian amon.
"Ciao, ciao * bambina ", ankoraŭ kison
poste por ĉiam mi perdos vin.
Kiel fabelo amo transiras,
ekzistis iam, jam nun ne plu.
Kio nun tremas sur viaj vangoj,
ĉu pluvo, larmoj? Klarigu al mi.
Mi volus trovi esprimojn novajn
sed, sub la pluvo, ploras kun vi.
"Ciao, ciao * bambina", nun ne turniĝu,
mi volus diri: restu kun mi;
sed mi ne trovas la taŭgajn vortojn,
dum pluvas, pluvas sur nian amon.

* prononco: ĉiao